M. 15124: 1.

FOLKLIVSARKIVET
Institutionen för folklivsforskning vid Lunds universitet

(översättn. 1 sida + brev)

Italien uppt. år 1952

Svar å LUF 85 rör. hästkött och hästslakt m. m.

s. 1.

LUIGI MINNAJA
Viale Giulio Cesare, 223 - ROMA

M. 15124.

FOLKLIVSARKIVET
Institutionen för folklivsforskning vid Lunds universitet

(14)

Roma, 2Lan de aprilo 1952a

Al la Universitato de Lund
Etnologia arkivo
Finngatan 8

LUND Svedujo

Rilate al la esploro pri la buĉado de ĉevaloj kaj manĝado de ĉevalviando mi kunsendas la koncernajn respondojn, laŭ la informoj, kiujn mi sukcesis ricevi.

Kun respektoplenaj salutoj

Luigi Minnaja

Ĉefdelegito de U.E.A. por Italujo

FOLKLIVSARKIVET
Institutionen för folklivsforskning vid Lunds universitet

(14) Italien M. 15124:1.

Pri ĉevalviando kaj pri buĉado de ĉevaloj en centra, suda (kaj supozeble norda) Italujo.

1) Antaŭe, ĝenerale la ĉevalviando ne estis tro ŝatata; nur malmultaj personoj, precipe malriĉaj, manĝis ĝin; de kelkaj jardekoj ĝi estas konsilata kiel kuraca manĝaĵo por certaj malsanuloj, kaj pro tio la uzado iom pli vastiĝis. Tamen ankaŭ nun la nombro de la manĝantoj estas tre malgranda.

2) La mortigado de ĉevalo, hundo kaj kato ne kaŭzis specialan malhonoron. Se temas pri buĉado por manĝado, ĝi tute ne estas efektivigata pri hundoj, maloftege pri katoj kaj ĝi estas konsiderata ne civila ago kaj iom honta.

3) Nek ekzistis nek ekzistas speciala persono, kiu havas la taskon mortigi ĉevalojn, hundojn kaj katojn. La ĉevaloj estis (kiel estas ankaŭ nun) mortigataj en la komunaj buĉejoj.

4) La mortigado de la suprediritaj bestoj okazis jene: ĉevaloj - post senkonsciigo per martelfrapo sur la frunto, aŭ post enigo de najlego en la frunton pere de martelo, aŭ eĉ sen tio, oni tranĉis la kol-arterion por sensangigi la beston; hundoj - ĝenerale oni mortigis ilin per venena manĝaĵo (peceto da viando kun striknino), aŭ per pafado,(kiel mi jam diris, hundojn oni ne manĝas); katoj - ĝenerale oni mortigis ilin per frapo sur la kapo aŭ per pafado, aŭ per dronigo, aŭ per venenigo; kompreneble ĉi-lasta maniero ne estis uzata, kiam la katoj estis manĝotaj.

Italien M.15124.

FOLKLIVSARKIVET
Institutionen för folklivsforskning vid Lunds universitet

Om hästkött och om slaktning av hästar i mellersta.södra (och förmodligen norra) Italien.

1. Tidigare var hästköttet i allmänhet inte särskilt omtyckt. Endast få människor, i synnerhet fattiga, åto det. Sedan några årtionden ordoneras det som botemedel för vissa sjukdomar, och därför har användningen något ökats. Emellertid är det fortfarande mycket få som äter sådant kött.

2. Dödandet av häst, hund och katt har ej förorsakat någon särskild vanheder. Vad beträffar slaktning till människoföda, så förekommer den alls inte av hundar, mycket sällan av kattor och den anses som en icke-medborgerlig handling och något skamlig.

3. Det finns ej och har ej funnits någon särskild person med uppgift att döda hästar, hundar och kattor. Hästarna dödades (och dödas fortfarande) på slakthusen.

4. Dödandet av ovannämnda djur har ägt rum på följande sätt: Hästar - efter bedövning genom ett hammarslag på pannan eller efter införande av en stor spik i pannan genom hammare eller till och med härförutan, skar man av halsådern för att tappa av blodet av djuret. Hundar - vanligen dödade man dem genom förgiftad föda (en liten bit kött med stryknin), eller genom skjutning. (Som jag redan sagt, äter man ej hundar). Kattor - vanligen dödade man dem genom ett slag på huvudet eller genom skjutning eller genom dränkning eller genom förgiftning. Naturligtvis användes ej detta sista sättet när man ämnade äta kattorna.

LEK/TB